FN PER ANC 47

Normanda Esperanto-bulteno

BULLETIN TRIMESTRIEL. TRIMONATA BULTENO. N° 9

--- SEPTEMBRO 1969 ---

xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx

Redaktas: S-ino J. VINCENT. Rue des Oiseaux -27- LES ANDELYS

Sendu la manuskriptojn antaŭ la 10-a de februaro, 10-a de majo, 10-a de aŭgusto kaj 10-a de novembro.

==========================================================================

ENHAVO:

Paĝoj: 1: Letero de la prezidanto
2: Federacia raporto
Vivo de la grupoj
3: En la kulturdomo
Eĥo el la 54-a U.K.
4: Por la infanoj
Kotiztabelo

+++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++

Karaj gesamideanoj,

Verŝajne mia silento surprizas vin.

Mi ne plu aperas en la regionaj kunvenoj... tamen mi restas fidela al Esperanto.

Ofte mi vojaĝas eksterlanden pro eksporto de varoj kaj kompreneble mi ne povas ĉie esti.

Mi nepre deziras nur diri al vi: Esperanto plene taŭgas por komercinterŝanĝoj, mi uzas efike la U.E.A-Jarlibron, Esperanto vere estas la Internacia Lingvo, ni restas sur la bona vojo.

Samideane via,

Marcel BOSC
Honorprezidanto.

FEDERACIA RAPORTO.

La 23-an de marto 1969, posttagmeze, okazis en Evreux la ĝenerala kunveno de la Normanda Federacio.

Je la 14-a, S-ro Jouis, prezidanto, malfermis la kunvenon. Post la raportoj de la sekretario kaj de la kasisto, oni reelektis trionon de la konsilantaro; la du konsilantoj, kies mandato ĵus finiĝis ( F-ino Beaudouin kaj S-ro Jouis) reprenis sian postenon kaj, pro kresko de la anaro, la kunveno decidis aldoni unu plian membron: F-ino Bonnet, el Les Andelys.

Poste, la ĉeestantaro diskutis la jarraportojn de U.F.E. Oni bedaŭris la plialtigon de ties kotizoj kaj proponis unuanime, ke la kotizo de la emeritoj restu je 20 F. Oni ankaŭ konstatis, ke la kursoj en la lernejoj malkreskis ĉijare. Por instigi la lernantojn trapasi ekzamenojn, la Zamenhof-centro en Les Andelys organizis konkurson kun premioj. La ĉeestantoj ankaŭ aprobis la ideon pri "aŭtentigitaj kursoj."

Post diskuto pri la maniero konservi la lernintojn, kun konkludo, ke oni nepre devas konstante informi ilin pri Esperanto, la esperantista vivo, la kongresoj... oni elektis kiel delegitinon en Strasbourg S-inon Bellettre kaj kiel anstataŭanton S-ron Loisel.

Fine oni lotumis libron inter la ĉeestantoj (gajnita de S-ro Saunier el Yvetot) kaj S-ro Jouis fermis la kunvenon je la 17-a horo.

Protokolis: S-ro Pottier.

xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx

VIVO DE LA GRUPOJ.

BAYEUX. F-ino CHERIE partoprenis la U.K; en Helsinki pere de la fluga karavano de U.F.E.

DOMFRONT. Sub la gvidado de S-ro Véron, kelkaj grupanoj pasigis tutan tagon en la Kulturdomo Grésillon en julio.

LES ANDELYS. S-ino VINCENT partoprenis la U.K. pere de la U.F.E-karavano.

LE HAVRE-YVETOT. La 18-an de majo okazis en Beuzevillette, post invito de G-roj Peltier el Le Havre, kiuj tie posedas bienon, amika renkontiĝo inter la membroj de la Havra Grupo kaj de la Yvetot-a Esperanto kulturcentro.

Agrabla pikniko en la naturo estis planita, sed bedaŭrinde la malbela vetero malvarma ne ebligis tion. Tamen tio ne tro ĝenis la ĉeestantojn, kiuj povis ŝirmi sin kontraŭ la pluvo sub tendo. Ĉar eĉ malvarmo ne povas senkuraĝigi la esperantistojn, multaj venis matene kaj aliaj kuniĝis kun ili je la komenco de la posttagmezo. Entute preskaŭ tridek samideanoj venis kaj pasigis la posttagmezon babilante, ludante kaj fine kantante en Esperanto en tre gaja atmosfero. Ĉiuj deziras renkontiĝi denove en la estonto inter si kaj kun aliaj grupoj.

Raporto sendita de S-ro Pottier.

--------

N.D.L.R. La raportoj, kiuj aperas sur ĉi tiu paĝo aspektas iom malnovaj. Ĉar ili atingis la redakcion post la limdato, ili ne povis aperi en la junia bulteno, jam presita.

EN LA KULTURDOMO.

Grésillon, kara Grésillon; kiel ĉiam, ni estas kontentaj, kiam ni venas ĉi tien. Neniam ni enuas, ĉiam ni ridas, kantas, ludas...

Sed ni ankaŭ laboras; estas kursoj, agrablaj kursoj. Ili okazas matene, kaj post la tagmanĝo, nia tuta posttagmezo estas libera. Ni povas bani, ludi tablotenison, balonon, kartojn kaj tiel plu; sed kelkfoje ni povas ekskursi kaj promeni. Do, vi povas vidi nun, ke en Grésillon ni vivas gaje kaj tio unue dank' al Sinjorino Vincent, kiu ebligas tion al ni, sed ankaŭ al la afableco de ĉiuj partoprenantoj.

Lisbeta, Martena kaj mi mem multe dankas ĉiujn kaj esperas, ke iun tagon ni reveturos al Grésillon, kie ni parolas nian belegan Esperanton.

PANNIER Veronika, 14-jara knabino.

---

EĤO EL LA 54-a UNIVERSALA KONGRESO.

El la malproksima Finnlando, lando de la 62 000 lagoj kaj de la senfinaj abiaj kaj betulaj arbaroj, mi alportas al la normanda esperantistaro iom el la frata etoso de tiu neforgesebla U.K. Majstre organizita de niaj nordaj amikoj, spite de ilia nesperteco (la sola finna U.K. okazis en 1922) kaj de la freŝdata enoficiĝo de la nova konstanta sekretario, la kongreso glate disvolviĝis de la 25-a de julio ĝis la 2-a de aŭgusto en la sunoplena ĉefurbo, en la tre moderna konstruaĵo Dipoli. Mi ne verkos ĉi tie detalan raporton, kiun ĉiu el vi povos legi en la septembra numero de la revuo "Esperanto" aŭ en "La Praktiko". Mi nur volas akcenti, ke pli kaj pli la oficialaj instancoj el la kongresa lando konsideras Esperanton kiel seriozan fakton; pli kaj pli altiĝas la prestiĝo de la Internacia Lingvo, kiu ne plu aspektas nun kiel agrabla tempopasigilo, sed kiel ebla solvo al la senĉesa akriĝanta lingvokonfuzo. El Helsinki mi alportas la esperon, ke baldaŭ devos malnodiĝi la lingva krizo. Kiu ŝtato donos la impulson, tion mi ne scias, sed tiu ekpaŝo ne plu povas multe prokrastiĝi. Ni unuigu niajn fortojn por helpi la ĝeneralan movadon kaj ni fidu la estonton.

S-ino J. VINCENT.

&°&°&°&°&°&

**POR LA INFANOJ ( daŭrigo)**

## LA TERENO DE FRANCISKO.

Kio surprizas Franciskon ne estas paŝti sola. Li nun konas ĉiujn "paquiers": li ŝatas Côte-Belle kaj ĝian malnovan lignodomon ĉe la arbar-enirejo, kaj la lageton, kie trinkas la ŝafinoj. En Chalou estas rivereto, kiu rapide kuras sin ĵeti en la Durance. Sur deklivo, junaj arboj kres-kas. En Chaumeyer, oni vidas lageton kun arboj. Sed la plej ŝatata loko de Francisko estas La Taro.

En La Taro ne estas damaĝoj, kaj la herbo abundas. La leporoj kuŝas en truoj kaŝitaj de la alta herbo. Ofte, Francisko vidas kelkajn, kiuj forkuras laŭ la deklivo, kun levita vosto kaj mallevitaj oreloj.

Ha! se li havus hundinon, kiel Diana, li kunportus hejmen, kio necesas por prepari bonan leporraguon!

( daŭrigota)

---

KOTIZTABELO.

| | | |
|---|---|---|
| Union des Espérantistes de Normandie. p.ĉ.k. Rouen 283-40 E | | 2 F |
| U.F.E. | sen "Revue Française" | 6 F |
| | kun "Revue Française" | 30 F |
| U.E.A. | kun Jarlibro | 17,50 F |
| | kun "Esperanto" kaj Jarlibro | 35 F |
| Fédération Normande des Centres Culturels "Esperanto" p.ĉ.k. Rouen 2348-06 Z | | |

---

**LASTHORE:**

S-ro TAILPIED el Touques (Calvados) kaj S-ro LEMARCHAND el Rouen restadis en la Kulturdomo Grésillon en aŭgusto.

---

Dépôt légal: 3ème trimestre 1969. La gérante: Mme J. Vincent.

Polycopié par le Centre Culturel et d' Amitié Internationale Zamenhof 27-Les Andelys.